


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Ĉina delegacio kun la hungaraj gastigantoj

3

----- 60-a jarkolekto
2016



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000
al eksterlanda adreso: EUR 12

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István
Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
„Szkenguru” Nyomda Budapest
Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO:

42. I. Gulyás: Ĉina delegacio en Hungario
43. J. Halász: Nitro – la unua paŝo en la dua jarcento
47. J. Halász: Interligo de fervojaj sistemoj (Tria parto)
53. A. Pásztor: Dek faktoj pri la historio de fervojo
54. I. Gulyás: Kuracaj akvoj en Hungario (Dua parto)

60-a jaro N-ro 3, JULIO-SEPTEMBRO

ĈINA DELEGACIO EN HUNGARIO

(ĈU OKAZOS KUNLABORO?)

En la mezo de majo kvarpersona delegacio venis al ni el Ĉinio. Tiu delegacio konsistis el la redaktoro de la reta revuo „El popola Ĉinio” kaj tri personoj flanke de la Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio. Akompanis ilin Wieslaw Libner el Pollando, kiu estas la prezidanto de la Pola Esperantista Fervojista Asocio.

Ili pasigis du tagojn kaj du noktojn en Budapest. Tiujn gastojn akceptis Gábor Pál, honora prezidanto de nia landa asocio de FISAIC, kaj mi kiel prezidanto de HFEA. Mi entreprenis la interpretistan taskon, kaj mi estis kune kun ili dum la dutagaj programoj. Ni faris kvarhoran urborigardon per speciala aŭtobuso en nia ĉefurbo, ni vizitis la „Fervojhistorian Parkon” kaj la Parlaŭmentojn. Fine ĉiu membro de la delegacio ricevis altvaloran donacon. La tutan restadkoston de la delegacio – la hotelon, ekskursojn, maten-, tagkaj vespermanĝojn – pagis VOKE, kaj la delegacio forvojaĝis tutkontente.

Kun la delegacio ni traktis pri la eblecoj de la kunlaboro sur la tereno de Esperanto-movado, pri la interŝanĝo de la folkloraj, pentristaj, skulptistaj kaj aliaj fervojaj kulturaj grupoj, pri la fervojaj instruadoj kaj kursoj, pri la efektivigo de la kunlaboro kaj pri la ligo de la „Kunlabora Interkonsento”, eĉ pri la vizito en Ĉinio de kelkaj membroj de VOKE por efektivigi la Kunlaboran Interkonsenton. Mi esperas, ke tiu kunlaboro estos utila kaj ekzemplodona kaj por VOKE kaj por HFEA, eĉ por aliaj landaj asocioj de IFEF kaj FISAIC.

István Gulyás

Nitro – la unua paŝo en la dua jarcento

La 101-a Universala Kongreso de UEA okazis en la slovakaj urbo Nitro inter la 23-a kaj 30-a de julio 2016. La kongreson partoprenis pli ol 1200 personoj el ĉiuj kontinentoj de la mondo. Ili alvenis en la kongresan urbon per diversaj trafikiloj, multaj per aviadilo al flughavenoj de Vieno, Bratislavo aŭ Budapeŝto kaj de tie kune kun aliaj per aŭtobusoj, taksioj aŭ trajnoj.

Dece al fervojisto, mi mem alvenis per trajno. El nia trajno descendis sufiĉe granda grupo de la kongresanoj. Antaŭ la stacidomo kelkaj kongresaj helpantoj atendis kaj direktis nin al la kongresejo. De la stacidomo ĝis la kongresejo ni veturis per speciala publikvoja trajneto, kiu portis la emblemon de la UK, kaj dum la alvenado konforme kun la fervoja horaro regule kaj senpage transportis la alvenintajn partoprenantojn de la stacidomo al la kongresejo.

La kongresejo troviĝis en la Agrokultura Universitato de Nitro. Mem la komplekso de la Universitato situas en granda parko (sur tereno de la iama flughaveno de Nitro) kaj konsistas el ses konstruaĵoj, kiuj estis konstruitaj inter 1960 kaj 1986. La komplekson oni taksas unu el la plej sukcesa kreaĵo de la moderna slovakaj arkitekturo.



La kongresejo

La unua grava kongresa programo estis sabate la **movada foiro** kiu estis aranĝita subĉiele sur placo antaŭ la kongresejo. Multaj Esperanto-organizaĵoj prezentis sin. Inter ili kun ĝojo mi trovis nian fakan federacion, IFEF. Nia prezidantino propagandis la 69-an IFEF-kongreson, invitis la interesiĝantojn partopreni ĝin en urbo *Colmar*, kaj ŝi disdonadis aliĝilojn. Ĉe alia tablo la Portugala Esperanto-Asocio ofertis prospektojn kaj bultenojn, kunligante ilin kun modesta vingustumado. Ili klopodis akiri la

simpation kaj favoron de la vizitantoj, ĉar ili kandidatiĝis aranĝi la 103-an UK. Estas kompreneble, plej granda nombro de la aktivuloj troviĝis ĉe la tablo de koreanoj, ja ili estas gastigantoj de la sekvonta UK. Entuziasme ili disdonis diversajn informilojn, prospektojn pri sia lando kaj pri Seulo.

Okaze de sia **unua kunsido**, sabate la **komitato** elektis la novan estraron de UEA. *Mark Fettes* estis reelektita kiel prezidanto. Krom li el la antaŭa estraro restis *Lee Jung-Kee*, *Stefan MacGill* kaj *Martin Schäffer*. La novaj estraranoj por la periodo 2016-2019 estas *Emilio Cid* (Brazilo) kaj *Maria Rosaria Spano* (Italio/Germanio).

Solena inaŭguro de la kongreso okazis dimanĉe, en la urba sporthalo, kiu estas en sufiĉe granda distanco de la kongresejo. La kongresanojn senpagaj eksterhoraraj aŭtobusoj transportis tien kaj reen inter la du lokoj.

Kvankam la kongreso ne okazis en la ĉefurbo, tamen ĉeestis nekutime multaj honoraj gastoj. Inter ili estis ambasadoroj de Japanio, Ukrainio kaj Kenjo, vicambasadoro de Korea respubliko kaj ataŝeo de Ruslanda ambasadejo. Inter la lokaj kaj naciaj gravuloj troviĝis du reprezentantoj de la kanceliero de la Slovaka prezidento (la Alta Protektanto de la kongreso estis *Andrej Kiska* Prezidento de la Slovaka Respubliko), urbestro de Nitro, du oficialaj reprezentantoj de la Eŭropa Unio.

Dum la inaŭguro estis publikigitaj la nomoj de tri novaj honoraj membroj de UEA. Ili estas *Vilmos Benczik* (Hungario), *Petr Chrdle* (Ĉeĥio) kaj *So Gilsu* (Korea respubliko). Festparolis *Mark Fettes* prezidanto de UEA.

Post la muzika paŭzo, dum kiu la ĉeestantoj povis aŭskulti slovakajn naciajn muzikilojn kaj kantojn, la reprezentanto de la slovaka poŝto informis, ke okaze de la kongreso aperis speciala Esperanto-poŝtmarko de Slovakio. Fine salutis la kongresanojn reprezentantoj de 49 landoj. La salutojn de hungaraj esperantistoj transdonis *Nanovszky György*, honora prezidanto de HEA.

Posttagmeze en la preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo estis **Ekumena Diservo**.

Vespere sur la urba ĉefplaco la **Nacia Vespere** estis ferma programo de la tago. Ni vidis altnivelan kulturan prezentadon de la plej fama kaj bona folkloro ensemblo de Slovakio, *Lúčnica*. Ĝi konsistas el ĥoro kaj danca ensemblo, La aranĝaĵo estis malfermita, ankaŭ la loĝantoj de Nitro rajtis spekti ĝin.

Lundo estis **kleriga tago**. Plimulto de la programoj okupiĝis pri demandoj de lingvaj aferoj (fremdaj lingvoj, tradukado, justeco literatura ktp.). Mi aŭskultis interesan prelegon de *Lydia Machova*, kiu estas profesia interpretistino en Slovakio. Ŝi parolas 10 lingvojn (inter ili ankaŭ Esperanton). La titolo de ŝia prelego estis „Kiel efike lerni fremdajn lingvojn”.

En la longa koridoro de la kongresejo Elizabeta *Ködmön* ekspoziciis 23 pentraĵojn, kiujn pentris membroj de Esperanto-Belartista Grupo el *Tata*. Ili en majo vizitis la nunan kongresurbon kaj eternigis per siaj pentraĵoj tiujn lokojn, kiujn la kongresanoj ĉiutage povis viziti, kaj kiujn ili kun ĝojo rekonis.



Dum la fervojista kunveno

Posttagmeze okazis la **fervojista kunveno**, kiun partoprenis ĉirkaŭ 40-45 intresiĝantoj. Prezidantino de IFEF *Rodica Todor* salutis la partoprenantojn, kaj mallonge prezentis nian Federacion. Ŝi informis pri 69-a IFEF kongreso, poste per helpo de mallonga filmo ni ekkonis la lokon de la kongreso en *Colmar* kaj la proksiman fervojan muzeon en *Mulhouse*.

Ĉeĥa kolego *Matuska Jaroslav* prezentis mal-

longan prelegon ilustritan per lumbildoj kies titolo estis „Slovakaj fervojaj allogaĵoj por turistoj”. Temis pri dentorela fervojlinio *Štrba-Štebské Pleso*; Tatraj elektraĵoj fervojoj

(TEŽ); perkablaj transportiloj; relvojhelico *Telgárt*; arbaraj fervojo.

Poste kolego *Ladislav Kovář* prelegis pri efektivigo de sistemo ETCS L2 sur fervojlinio Žilina-Čadca. Ankaŭ dum ĉi tiu prelego ni vidis multajn lumbildojn.

Poste en la Libroservo okazis la **Aŭtora Duonhoro** de nia aŭstra amiko *Martin Stuppniĝ* pri lia aŭtobiografia verko, titolita „Home en sen-homeco. Militimpresoj”

Vespere nia **hungara kongresa grupo** festis. Ni

kunvenis en Hotelo *Átrium* gratuli al tiuj kongresanoj, kiuj festis naskiĝtagon, aŭ nomtagon dum la kongreso. El ili *Elizabeta Ködmön*, Dr-o *Imre Ferenczy* kaj *Georgo Flender* festis naskiĝtagon, Anja Amika kiu venis per kantoj gratuli al ili festis nomtagon. Je la nomo de la ĉeestantoj *Nanovfszky György* salutis la festitojn kaj gratulis al ili.

Antaŭ noktmezo alvenis en Nitron mia nepo *Soma*, kiun mi atendis en la stacidomo. Li partoprenis kaj konkursis en Pollando en urbo *Bydgoszcz* en la Junulara Atletika Mondĉampionado. La du aranĝaĵoj en tempo estis tre proksime unu al la alia kaj li tiam povis alveni en nian kongreson.

Mardo estis **tago de lernado**. Posttagmeze ni spektis **artan projekton** speciale preparitan por la 101-a UK. La muzik-dancan poemaron surscenigis artistoj de la Nacia Teatro en *Brno*. Ĝia titolo estis „Tuŝoj je animo”. (La prezentado estis dulingva slovakaj – Esperanta). La muzika, koncerta programo de la kongreso estis riĉa. Marde vespere ni aŭskultis la koncerton de grupo *Easy steps*.

Merkrede okazis la **tuttagaj ekskursoj**. Ni vizitis la malnovan urbon *Trnava* (hungare *Nagyszombat*). Loka ĉiĉerono atendis nian grupon, kiu rakontis pri la historio de la urbo kaj montris al ni kelkajn historiajn konstruaĵojn. Ni vidis la restaĵojn de la iama defenda muro de la urbo, kaj konstruaĵon de la universitato. La universitaton en 1635 fondis *Pázmány Péter* ĉefepiskopo de *Esztergom*, kardinalo, la ĉefa figuro de la kontraŭreformacio. Apud la universitato fukciis ankaŭ biblioteko kaj presejo. Tiutempe la urbo estis centro de la hungara kulturo. Laŭ dekreto de imperiestrino kaj reĝino *Maria Terezia* en 1777 la universitaton oni translokigis en *Buda*. (La universitato de *Nagyszombat* estas laŭleĝa antaŭulo de la nuna Budapeŝta Universitato *Eötvös Loránd*). Poste dum longa tempo la konstruaĵoj de la universitato estis uzataj kiel hospitalo de militinvalidoj. Dum nia promenado cetere ni rigardis la urbodomon kaj la 70 m-ojn altan urboturon. Sekve la promenadon en restoracio ni tagmanĝis, kaj post la tagmanĝo ni vizitis memstaran vinproduktan agrokulturistan familion. La geedza paro estas vinologoj. Ili ne havas vitejon, sed aĉetas la vinberojn el kiuj ili mem



Partoprenantoj de la fervojista kunveno

produktas diverspecajn vinojn. Lasta programero de nia ekskurso estis la vingustumado ĉe ĉi tiu simpatia familio.

Ĵaŭde ni vizitis iun konferencon, kiu rolis en la kongreslibro. Ĝia titolo estis „**Lingvopolitika konferenco** de landoj V4 – Universitato UKF”. La loko de tiu konferenco estis for de la kongresejo, kiun ni atingis per longa piediro. Post nia alveno ni spertis, ke temas pri iu paralela aranĝaĵo, kies oficialaj lingvoj estis angla kaj slovaka. Ni aŭskultis la anglalingvan prelegon de *Mark Fettes* prezidanto de UEA.

Posttagmeze ni partoprenis la **publikan kunsidon de Akademio** de Esperanto. La vespera programo estis la **koncerto** de *Martin Wiese*. La tagan programon fermis por la junularo nokta promenado en la urbo.



Antaŭ la kongresejo kun la Majstro

Vendrede ni aŭskultis interesan **prelegon** pri politiko de Aŭstralio. Lasta kultura programo de la UK estis vespere la **Internacia Muzika Festivalo** sur la urba ĉefplaco. Simile al la Nacia Vespero temis pri malferma aranĝaĵo, kiun partoprenis ankaŭ multe da lokaj loĝantoj.

Sabate la **Solena Fermo** – simile al la inaŭguro – okazis en la urba sporthalo. Ĉi-okaze UEA diplomis 14 elstarajn agantojn, inter ili estis *Márkus Gábor*, kiu ricevis la diplomon por kontribuoj al la Esperanto-literaturo kaj al la disvastigo de Esperanto en Azio. La lokon de la 102-a UK jam ni

konis, nun estis deklarita, ke en 2018 la UK okazos en Portugalio en urbo Lisbono. La kongresanoj per tondra aplaŭdado dankis tiun grandegan laboron kiun la LKK kaj multnombra helpantaro faris por sukceso de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto.

Taksi la kongreson mi citas la estraran komunikon de UEA: „Gлата organizado, tre konvena kongresejo, bonega tuturba vidigo de Esperanto kaj rekorde ampleksa parto de la kongresa programo malferma al la urba publiko”.

La kongreso finiĝis. Ni estu optimistoj – ĝis revido en Seulo en 2017!

D-ro József Halász

INTERLIGO DE FERVOJAJ SISTEMOJ

(tria parto)

En la 1/2016 kaj 2/2016 numeroj de HFM ni aperigis la unuan kaj la duan partojn de tiu artikolo. Nun ni daŭrigas kaj finas tiun tre interesan temon en la tria parto de la artikolo.

3.4 POSTULOJ KONCERNANTAJ LA UNUOPAJN SUBSISTEMOJN

3.4.1 Infrastrukturo:

Sekureco

- oni devas disponi por malhelpi la senrajtan aliron de la establaĵoj aŭ enpaŝi en ilin
- precipe okaze de transiro de trajnoj tra la stacioj, oni devas disponi por malhelpi danĝerojn kiuj povas kaŭzi vundiĝon de personoj
- oni devas projekti kaj estigi la instalaĵojn de la infrastrukturo atingeblajn por ĉiu tiel, ke malpliigu la riskoj, endanĝerigi la personan sekurecon (stabileco, kontraŭincendia defendo, trapasado, evakuo, kajoj ktp)
- oni devas fari la bezonatajn ordonojn konsideri la specialajn sekurecajn kondiĉojn de la tre longaj tuneloj kaj subpasejoj

Garantio de la akirebleco

- subsistemoj de la infrastrukturo atingeblaj por ĉiu, devas esti akireblaj por handikapuloj kaj por personoj kun reduktita movkapablo.

3.4.2 ENERGIO:

Sekureco

- la funkciado de energiproviza sistemo ne povas endanĝerigi la sekurecon de trajnoj kaj personoj (pasaĝeroj, funkciiga personalo, apudrelvojoj loĝantoj, kaj triaj personoj)

Medioprotektado

- la funkciado de elektra kaj varma energiprovizaj sistemoj ne povas ŝarĝi la medion pli ol la permesita limvaloro

Teknika konformiĝo

- la elektra kaj varma energiprovizaj sistemoj devas certigi la atingon de difinita povumvaloro por la trajnoj
- la elektraj energiprovizaj sistemoj devas konformiĝi kun kurentodepreniloj de trakciiloj

3.4.3 Kontrolaj, ordonvojaj, signalaj sekurigaj instalaĵoj:

Sekureco

- la kontrolaj, ordonvojaj, signalaj, sekurigaj instalaĵoj kaj procedoj aplikataj en Eŭropa fervoja sistemo ebligu ke la trajnoj estu kapablaj trafiki konforme al sekurigaj postuloj difinitaj por la reto, kaj ili certigu la sekuran trairon por la permesitaj trajnoj eĉ okaze de reduktita funkciadmaniero

Teknika konformiĝo

- tiuj elementoj de la infrastrukturo kaj veturiloj kiuj estos produktitaj post aprobo de apliko de konformiĝeblaj kontrolaj, ordonvojaj, signalaj, sekurigaj instalaĵoj kaj procedoj devas konveni al la aprobata sistemo
- la enveturilaj kontrolaj, ordonvojaj, signalaj, sekurigaj instalaĵoj kune kun la difinitaj kondiĉoj devas ebligi la daŭran funkciadon sur la tuta reto de Eŭropa fervoja sistemo

3.4.4 Bontenado:

Sanprotektado kaj Sekureco

- la teĥnikaj instalaĵoj kaj procedoj aplikitaj en la bontenadaj establejoj, metiejoj devas garanti la sekuran funkciigadon de la subsistemo, ili ne povas endanĝerigi la sanon kaj sekurecon de personalo kaj tiun de triaj personoj

Medioprotektado

- la medioefikoj kaŭzitaj de teĥnikaj instalaĵoj kaj procedoj aplikitaj en la bontenadaj establejoj, metiejoj ne povu transpaŝi la permesitan limvaloron. Streĉite oni devas direkti atenton respekti la postulojn de manipulado de rubaĵo, precipe tiun de estiĝinta danĝera rubaĵo

Teĥnika konformiĝo

- konvenan al sanprotektaj, ergonomiaj postuloj en ĉiuj tiuj veturiloj por kiuj oni planis la bontenadajn instalaĵojn estu tiel, ke ili ebligu la laboradon sekuran

3.4.5 Eksploatado kaj trajntrafikregado:

Sekureco

- kunordigo de la retfunkciigaj reguloj, kaj klerigo de kondukistoj, veturanta kaj trafikreguliga personalo devas garanti la sekuran eksploatadon, konsidere al diferencoj de postuloj inter servoj enlandaj kaj ligiĝantaj al limtransiro
- la bontenadan agadon kaj ties oftecon; la klerigon kaj kvalifikon de personalo de bontenadaj kaj ekzamenaj lokoj; kaj la kvalitgarantian sistemon enkondukitan de koncernaj eksploatantoj en la regadaj kaj bontenadaj centroj oni devas aranĝi kaj apliki tiel, ke la altnivela funkciada sekureco estu garantiita.

Fidindeco kaj disponeblo

- la altnivelan fidindecon kaj disponeblon oni devas akiri per klerigo de personalo de bontenadaj kaj ekzamenaj lokoj kaj pere de la kvalitgarantia sistemo enkondukita de koncernaj eksploatantoj en la regadaj kaj bontenadaj centroj

Teĥnika konformiĝo

- oni devas akordigi la retfunkciigajn regulojn kaj kvalifikon de kondukistoj, veturanta kaj trafikreguliga personalo tiel, ke tio certigu la efikan eksploatadon de la fervoja sistemo, konsidere la diferencojn de postuloj inter servoj enlandaj kaj ligiĝantaj al limtransiro

Garantio de la akirebleco

- per ĝustaj disponoj oni devas zorgi pri tio, ke reguloj de la eksploatado preskribu tiujn bezonatajn funkciojn laŭ kiuj por handikapuloj kaj por personoj kun reduktita movkapablo la akirebleco estas certigebla

3.4.6 Telematikaj aplikadoj por pasaĝertrafikaj kaj vartransportaj servoj:

Teĥnika konformiĝo

- la fundamentaj postuloj koncernaj la telematikajn aplikadojn devas garanti iun minimuman nivelon de kvalito de la servoj por la pasaĝeroj kaj vartransportistoj precipe koncerne la teĥnikan konformiĝon
- oni devas disponi pri certigo de la sekvaj:
 - la evoluigon de softvaroj kaj datumtransigaj protokoloj oni devas solvi tiel, ke tio ebligu la maksimuman datuminterŝanĝon inter la diversaj aplikadoj kaj funkciigantoj, escepte manipulado de la konfidencaj komercaj datumoj

- o la informoj estu facile akireblaj por la uzantoj

Fidindeco kaj disponeblo

- la uzo, manipulado, aktualigo kaj bontenado de datumbazoj, softvaroj kaj datuminterŝanĝaj sistemoj devas certigi efikecon de la sistemoj kaj kvaliton de la servoj

Sanprotektado

- la kontaktpunktoj inter la difinitaj sistemoj kaj uzantoj devas plenumi la minimumajn ergonomiajn kaj sanprotektajn preskribojn

Sekureco

- oni devas garantii la konvenan integrecon kaj fidindecon de la datumoj okaze de deponado kaj plusendo de informoj koncernaj la sekurecon

Garantio de la akirebleco

- per ĝustaj disponoj oni devas zorgi pri tio, ke subsistemoj de la telematikaj aplikadoj koncernaj la pasaĝertrafikajn servojn havu tiujn funkciojn, per kiuj estas certigebla la akirebleco por handikapuloj kaj por personoj kun reduktita movkapablo

3.5 LA KONDIĈOSISTEMO DE LA INTERLIGO

Fundamentaj postuloj kaj Tehnikaj Specifaĵoj por Interligo

- la fervojaj sistemo, subsistemo kaj sistemelementoj certigantaj la interligon, devas konveni al la fundamentaj postuloj
- la subsistemon koncernas unu aŭ pli TSI-oj, unu TSI povas koncerni ankaŭ pli subsistemojn
- la subsistemo je ekfunkciigo, modernigo, aŭ renovigo devas konveni al TSI-oj validaj samtempe, kaj la subsistemo devas plenumi al ĉi tiun postulon dum la tuta tempodaŭro de sia uzo.

3.6 ELLABORADO DE TSI-OJ

La projektojn kaj modifadojn de TSI-oj Eŭropa Fervoja Agentejo (ERA) (en la ceteraj Agentejo) ellaboras laŭ mandato ricevita de Eŭropa Komisiono (en la ceteraj Komisiono). Tio okazas en du fazoj:

1. La Agentejo identigas la parametrojn de TSI-oj respektive la interrilatajn punktojn kun aliaj subsistemoj kaj ĉiujn specialajn aferojn
2. La Agentejo ellaboras la projekton de TSI-oj, konsiderante la teĥnikan evoluon, la normigon jam faritan, kaj rezultojn de esploroj

Oni devas ekzameni pritaksitajn kostojn de la efektivigo, kaj atendeblajn efikojn kaŭzatajn por ekspluatantoj kaj ekonomiaj rolantoj

La Komisiono aperigas la TSI-ojn en Oficiala Bulteno de Eŭropa Unio

La ellaborado de TSI-oj okazas dum pli periodoj. Unue oni ellaboris la TSI-ojn, kiuj koncernas la grandrapidan fervojan sistemon (HS):

- Bontenado (HS MAI)
- Infrastrukturo (HS INS)
- Energio (HS ENE)
- Veturiloj (HS RST)
- Kontrolo, ordonoj kaj signala sistemo (HS CCS)

- Eksploatado (HS OP)

4. ENKOMERCIGO DE SISTEMEMENTOJ

Oni povas enkomercigi la sistemelementon

- se ĝi konformiĝas al la fundamentaj postuloj
- ĝi estas aplikebla sole sur la planita tereno
- se ĝia ne porfervoja apliko estas permesebla

La instanco ne rajtas malhelpi aŭ limigi uzon de la sistemelemento en fervoja sistemo, se ĝiajn kvaliton kaj uzeblecon oni jam atestis pere de aŭtentiga procedo de Eŭropa Komunumo (en la ceteraj: EK-aŭtentiga procedo)

La sistemelementon oni devas subordoni al taŭgeca procedo difinita en TSI koncernanta pri la menciita sistemelemento kaj oni devas aldoni la konvenan atestilon.

Tiu sistemelemento konvenas al la fundamentaj postuloj, kiu havas deklaron de Eŭropa Komunumo pri konformeco aŭ taŭgeco por uzo. (en la ceteraj: EK-deklaro pri konformeco aŭ taŭgeco por uzo)

Procedon de la atesto faras tiu notita organiaĵo al kiu la produktanto prezentis la petskribon. (Se tion ĝi preterlasas, la tasko trairas al la komercisto)

Okazo de malkonformeco de la sistemelemento:

Se la sistemelemento ne konvenas al la fundamentaj postuloj, la EK-deklaron pri konformeco oni faris mise, ĉe la enkomercigita sistemelemento la manko de la konformeco ekzistas daŭre, la instanco malpermesas aŭ limigas uzon de la sistemelemento kaj pri tio pere de la ministro informas la Komisionon.

Se la Komisiono la aranĝon opinias ĝusta, tio restas valida. Se ĝi opinias tion senmotiva, la instanco estas devigata senprokraste retiri tion.

Se la sistemelemento havanta EK-deklaron pri konformeco ne konvenas al preskriboj koncernantaj la sistemelementon, la instanco proponas al la deleginto limigi aŭ retiri funkciadon de la organizaĵo pretiginta la EK-deklaron pri konformeco.

Pri tio ĝi informas la Komisionon kaj membrostatojn de Eŭropa Komunumo.

5. ENSERVIGO DE SUBSISTEMOJ

La subsistemon aŭ ties iun parton de la fervoja sistemo oni povas enservigi sole tiuokaze kaj ĝi estas ekspluetebla nur tiam, se ĝiaj planado, efektivigo, instalado kaj bontenado garantias, la subsistemo aŭ ties iu ajn parto konformiĝas al la fundamentaj postuloj.

Permesa bazo de la enservigo estas la EK-aŭtentiga deklaro eldonita surbaze de EK-aŭtentiga procedo.

Enservigon kaj ekspluatadon de struktura subsistemo – kiu estas parto de la fervoja sistemo – oni ne povas malpermesi aŭ limigi, se ĝi konformiĝas al la fundamentaj postuloj.

Oni ne rajtas preskribi tiun kontrolon, kiu jam okazis

- a) kiel parto de la EK-aŭtentiga procedo
- b) en iu alia membroŝtato inter samaj funkciaj kondiĉoj por kontroli la konformiĝon al samaj postuloj

Tiu struktura subsistemo de la fervoja sistemo estas rigardebla interliga kaj konformiĝa al la fundamentaj postuloj koncernaj pri ĝi, kiu havas EK-aŭtentigan deklaron.

La EK-aŭtentigan procedon pri interligo de iu struktura subsistemo formanta fervojan sistemon pretigas notita organizaĵo delegita por tiu tasko konforme kun la fundamentaj postuloj aludante al la koncernaj TSI-oj.

La permesdona instanco kompilas liston pri apliko de teĥnikaj perskriboj nekovritaj per TSI-oj aŭ diferencaj de TSI-oj. Pri la listo kaj pri ĝiaj ŝanĝoj la instanco informas la Komisionon.

La liston de ekskluzive loks signifaj, la interligon ne tuŝantaj reguloj kaj limigoj oni ne devas sendi al la Komisiono. Ĉi tiujn oni devas fiksi en infrastrukturan registron de la relvojrreto.

6.EK-AŬTENTIGA DEKLARO

Atesti konformecon de la subsistemo, la peticianto komisiis la notitan organizaĵon elektitan de si mem fari EK-aŭtentigan procedon. Agado de la notita organizaĵo komenciĝas de la planfara etapo kaj enhavas la tutan konstruan aŭ produktan periodon kaj daŭras ĝis la transpreno antaŭ enservigo de la subsistemo. La notita organizaĵo responsas pri kompilo de teĥnika dokumento apartenanta al EK-aŭtentiga deklaro.

La peticianto pretigas la EK-aŭtentigan deklaron por la inspekta organizaĵo (por la instanco).

7.LA NOTITA ORGANIZAĴO

La ministro sciigas al la Komisiono pri delegado kaj agadsfero de la esplora kontrolo kaj atestanta organizaĵo, same tiel al membroŝtatoj de la Eŭropa Komunumo pri identiga numero akirita anticipe de la Komisiono, kaj pri agadsfero de la organizaĵo.

Oni devas akcepti la EK-deklaron pri konformeco aŭ taŭgeco por uzo de sistemelementoj kaj EK-aŭtentigan deklaron de tiu notita organizaĵo, funkcia en iu ajn membroŝtato de Eŭropa Komunumo, kiu estas en la listo aperigita en Oficiala Bulteno de Eŭropa Unio.

Se la instanco konstatas, ke la notita organizaĵo, funkcia en iu alia membroŝtato de la Eŭropa Komunumo ne konvenas al koncernaj preskriboj, pri tio ĝi tuj informas la ministron. Se iu membroŝtato aŭ la Komisiono prijuĝas tiel, ke iu notita organizaĵo anoncita de iu alia membroŝtato ne konvenas al la preskribitaj kondiĉoj, la Komisiono konsultiĝas kun la koncernataj flankoj. La Komisiono informas la notitan membroŝtaton pri tiuj ŝanĝoj kiuj estas bezonataj por la notita organizaĵo konservi sian agadsferon.

Estro kaj personalo responsa pri kontrolado de la notita organizaĵo povas patopreni planadon, produktadon, konstruadon, vendon, bontenadon aŭ uzon de sistemoj aŭ subsistemoj ebligantaj la interligon nek rekte, nek pere. **(neakordigebleco)**

La organizaĵo responsa pri kontrolado kaj ĝia personalo devas kontroli laŭ pretendeble plej alta faka nivelo, kaj devas decidi aŭ publikigi rezultojn de sia kontrolado sen ies ajn influo.

La personalo responsa pri kontrolado devas havi:

- konforman teĥnikan kaj fakan kvalifikojn
- konformajn kondiĉojn pri postuloj de la kontroloj farantaj de si mem, sufiĉe da praktiko sur tereno de ĉi tiuj kontroloj
- rajtigojn pretigi tiujn atestilojn, protokolojn kaj raportojn kiuj estas oficialaj dokumentoj de la faritaj ekzamenoj

La notita organizaĵo devas certigi por la personaro responsa pri kontrolado la sendependecon. Financa aŭ alispeca salajro de la personaro povas dependi nek nombro de la kontroloj, nek iliaj rezultoj.

8.REGISTRO DE LA RELVOJA RETO

En registro troviĝanta ĉe la instanco oni devas indiki la ĉefajn karakterizaĵojn de la fervoja reto, relvojo, unuopaj koncernaj subsistemoj aŭ tiun de partoj de subsistemo, kaj iliajn interrilatojn al preskribitaj karakterizaĵoj de TSI-oj. Laŭ peto la instanco por ĉiu ebligas aliron de la registro, kaj pri tio ĝi informas la Agentejon.

RIMARKOJ DE LA VERKISTO

Ĉi tiu materialo enhavas tiujn preskribojn de EU pri la fervojoj, kiujn oni devas apliki en ĉiu membroŝtato. Temas pri komuna direktivo de la Parlamento kaj Konsilantaro, kiu estas tradukita al 24 lingvoj, kiun la membroŝtatoj simile al Hungario adaptis, kaj aperigis en siaj gepatraj lingvoj. Pro la traduko en la unuopaj naciaj lingvoj kelkaj nocioj povis ricevi diversajn signifojn. Ĉi tiu teksto ne estas traduko de la unia direktivo. Mi verkis ĝin plejparte laŭ la menciita hungara ministra dekreto, kiu ne estas sama kun la hungarlingva traduko de la unia direktivo. Kelkfoje mi provis sekvi ankaŭ la anglan version de la unia direktivo. Kelkajn specialaĵojn mi mencias:

- la hungara titolo de la ministra dekreto estas: „Reciproka trairebleco de fervoja sistemo” (A vasúti rendszer kölcsönös átjárhatóságáról)
- mi klopodis verki tiel, ke la internacie konata nomo de TSI-oj havu saman formon ankaŭ en la Esperanto teksto. Ili en la hungara versio havas formon ÁME, kiu signifas: „Teĥnikaj preskriboj de trairebleco” (Átjárhatósági Műszaki Előírás)

Do, niaj alilandaj kolegoj kiuj konas sian nacilingvan version de ĉi tiu materialo, ne surpriziĝu, se trovos diferencojn inter sia nacia versio kaj ĉi tiu verko. Verŝajne ĉiu nacilingva versio havas diferencojn, kaj specialaĵojn. Bedaŭrinde pro la jura karaktero de la teksto ĝia stilo ne estas belliteratura.

FONTOJ:

- [1] 30/2010 (XII.23) NFM Rendelet. A vasúti rendszer kölcsönös átjárhatóságáról
- [2] Interoperability Directive (2008/57/EC-EUR Lex-Europa)
- [3] https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭropa_Unio
- [4] https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭropa_Parlamento
- [5] <https://eo.wikipedia.org/wiki/Konsilio> de la Eŭropa Unio
- [6] https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭropa_Komisiono
- [7] https://eo.wikipedia.org/wiki/Európai_Vasúti_Ügynökség
- [8] <https://eo.wikipedia.org/wiki/ETCS>

D-ro József Halász

DEK FAKTOJ PRI LA HISTORIO DE FERVOJO

1./ En 27-an de septembro 1825 oni malfermis la unuan laŭhoraran publiktrafikan fervojon en Anglio inter Stockton kaj Darlington. Sur la 14 km-jn longa linio je la unua fojo la vaporlokomotivo de George Stephenson laŭiris. La nomo de la lokomotivo estas „Lokomotion”. La vagonaro trakciis vagonojn kun karbo kaj pasaĝeroj. La vaporlokomotivo trafikis plenrapide 24 km/h.



2./ Antaŭ la apero de la trajno en Anglio la tempomezuro ne estis unueca. Post la apero de trajno granda parto de la kolonioj ŝanĝis la tempon laŭ la „greenwicha” meztempo, sed la ĝenerala ŝanĝo okazis nur en 1855.

3./ En la 1820-aj jaroj en la londona parlamento okazis debato pri la fervoja trafiko. Kelkaj deputitoj argumentis kontraŭ la vaporlokomotivo, por ke la homoj freneziĝos pro la 10 mejla rapideco.

4./ La unua usona vaporlokomotivo – Tom Thumb – malgajnis konkurson kontraŭ la ĉevaltirita trajno, ĉar la lokomotivo dumvoje difektiĝis. Tamen en la Usono la fervojo havis popularecon, kaj en 1916 la longo de la fervojlinio estis 400 mil km-j.

5./ La komfortaj vagonoj de George Pullman estis tro multekostaj, pro tio la fervojaj entreprenoj ne aĉetis ilin. En la jaro 1865 la kadavron de Abraham Lincoln oni transportis tra Usono per „Pullman-vagono”, poste la negoco ekfunkciis. Post la civitana milito ĉe la entrepreno Pullman laboris la plej multnombraj negroj.

6./ En la jaro 1865 la fama verkisto Charles Dickens suferis trajnakcidenton ĉe la urbo Staplehurst. La trajno elreliĝis kaj faliĝis al valo. 10 pasaĝeroj mortis, 49 vundiĝis. La verkisto estis inter la vunditoj, kaj transvivis la akcidenton.

7./ En la 28-an de aprilo 1869 irlandanaj kaj ĉinaj laboristoj konstruis 16 km-jn longan relparon dum unu tago ĉe la konstruaĵo de la „Central Pacific Railroad” inter la fervojlinio Utah kaj Kalifornia. Tiu laborprodukto ankoraŭ nuntempe estas rekordo.

8./ En 1890 la inĝeniero Luke Livingston Macassey planis subakvan fervojlinion inter la skota urbo Stauraer kaj la irlanda urbo Belfast. Ambaŭ ŝtato akceptis la planon, sed tamen tio ne efektiviĝis.

9./ En la jaro 1907 Jesus Garcia fervoja bremsisto oferdonis sian vivon por savi la vivon de la meksikiana urbeto Nacozari. Li kondukis la brulantan trajnon ses km-jn de la urbeto, kiu estis ŝarĝitaj kun dinamitoj. Tie la trajno eksplodiĝis, la bremsisto mortis.

10./ En 1938 en Anglio vaporlokomotivo – nomita „Mallard” – rapidegis kun rapideco 202,8 km/h. Tiu rapideco estas ankoraŭ nuntempe rekordo inter la vaporlokomotivoj.

Kompilis: **Adri Pásztor**

KURACAJ AKVOJ EN HUNGARIO (DUA PARTO)

En Hungario troveblas entute pli ol 150 termalakvaj banejoj, kiuj funkcias en 45 urboj, vilaĝoj kaj aliaj lokoj. Inter ili la budapeŝtajn kuracbanejojn mi prezentis en la antaŭa (2/2016) numero de HFM. En ĉi tiu numero de nia revuo mi prezentas la provincajn banejojn. El la 45 lokoj mi prezentas nur la plej famajn, vizitantajn kaj frekventantajn provincajn banejojn, ĉar ĉiun prezenti ni ne havas sufiĉan spacon.

En la lastaj dek jaroj preskaŭ ĉiuj banejoj havis infrastrukturajn plilarĝigojn, estiĝis retoj de la „Wellness” hoteloj, konstruiĝis kaj moderniĝis multaj „aqua”-parkoj kaj kuracbanlokoj. Multaj banlokoj havas hospitalon, kurachotelon, sanatorion kaj rehabilitan fakhospitalon. Ekz. en Balf troveblas sanatorio, en Parádfürdő, Szentes, Hajdúszoboszló kaj Harkány hospitalo, en Balatonfüred, Visegrád kaj Szentgotthárd



Hévíz el birdoperspektivo

rehabilitaj fakhospitaloj kaj en Miskolc-Tapolca grotbanejo.

La kuracakvoj estas envicigitaj laŭ kemia analizo al sekvaj kategorioj: simplaj karbacidaj akvoj; kalkhavaj akvoj; alkaloidaj akvoj; kloridaj akvoj; amaraj akvoj; ferhavaj akvoj; sulfurhavaj akvoj; jodidaj kaj bromidaj akvoj; radio-aktivaj akvoj kaj termoakvoj. La kuracakvojn oni povas uzi ekstere kiel banakvo, interne kiel trinkakvo. Estas interese, ke la temperaturon de la kuracakvo determinas la „geoterma gradiento”, kies meznombra valoro en Eŭropo

estas 33 m/1C°. En Hungario tiu numero estas 20 m/1C°, do tio signifas, ke en nia lando relative el pli malgranda profundeco kunportebblas la kuracakvo. La kuracakvon oni nomas ĝis 30 C° malvarma, se la temperaturo superas tiun Celsius-gradon, la akvo estas termakvo. En Hungario pli ol mil putoj donas varman kuracakvon, el kiuj pli ol 70%-oj troveblas en la Ebenaĵo.

La kuracbanlokoj donas balneoterapiajn kuracadojn per kuracakvoj, kuracŝlimoj kaj per aliaj naturalaj mineral-kuracmaterialoj. Por decidi al la malsanulo la plej efikajn balneoterapiajn kuracadojn estas la taskoj de la kuracistoj.

Estas malbona afero elekti kelkajn kuracbanlokojn el la 45, ĉar mi ne estas kompetenta fakulo pri la balneologio, tamen mi devas laŭ mia plej bona kaj bonfida kono fari tion. Jen:

Hévíz

La plej fama banloko de Hungario estas Hévíz. Ĝi situas proksime al la lago Balatono. Sur la teritorio de la urbo Hévíz estas la natura torfbasena kuraĉlago, kiu estas unika formiĝintaĵo en la mondo. Ĉirkaŭas ĝin 50 hektaraj protektata arbaro. Estas grave, ke Hévíz rolas sur tiu listo, kiu enhavas la kandidatojn de la Monda Heredaĵo de Unesko,



kaj mi esperas, ke en la proksima estonteco iĝos la urbo kun la lago „Natura Monda Heredaĵo” de Hungario. La historio de la kuraclago estas tre interesa, ĉar jam la romianoj konis la kuracajn efikojn de la lago, kion pruvas la romiaj moneroj, kiujn la subakviĝistoj trovis en ĝi. Uzis la lagon la germanoj kaj slavo, kaj aliaj migrantaj popoloj. La unua skriba mencio pri la lago devenas el la 14-a jarcento, kaj la unua studo pri ĝi aperis en la jaro 1769. La estiĝo de la banloko

okazis en la mezo de la 18-a jarcento fare de grafo György Festetics.

La akvon de la lago kelkaj boladgroto donas el la profundo. La profundeco de la lago estas 38,5 metroj. La temperaturo de la lago somere estas 33-35 C⁰, kaj vintre 24-26 C⁰. Tiun temperaturon rezultas el miksiĝo de malvarma karstakvo kun geoterme hejtita termakvo. La akvo enhavas kalcion, magnezion kaj radonon, eĉ sulfuron. La biologia aktivo estas signifa pro la organikaj komponaĵoj, kiuj donas unikan karakteron de la akvo. En la lago troveblas multaj utilaj bakterioj, mikroskop-dimensiaj bestetoj, kelkspecaj fiŝoj kaj rampaĵoj.

Apud la lago konstruiĝis la reumahospitalo „Szent András”, en kiu fakkuracistoj pretigas al ĉiuj malsanuloj individuan terapiplanon, kaj faras ili kontinujajn kontrolojn. La alia konstruaĵo por la malsanuloj estas la „Hotel Spa Hévíz”, kiu helpas la resaniĝon per diversaj rehabilitaj programoj per ĉiutagaj banadoj en la lago, kaj per kontinuaj kuracistaj kontroloj.

Hajdúszoboszló

Post Hévíz la plej granda kaj vizitata banloko de Hungario estas Hajdúszoboszló. La urbo troviĝas je 22 km okcidente de urbo Debrecen. La unua skriba mencio pri la urbo devenas el 1075. En la jaro 1606 István Bocskai translokiĝis ĉi tien hajdukon, kaj ekde tiam la urbo ricevas la antaŭnomon „Hajdú”. La turkoj en 1660 detruis la urbon, kaj nur en la 19-a jarcento ĝi transsuperis tiun grandan plagon.



En la jaro 1925 okazis esplorborado, kaj anstataŭ oleo aŭ gaso oni trovis termakvon. Tiu akvo ekirigis la konstruadojn, kaj rapide konstruiĝis kuracbanejo, plaĝo, naĝejo kaj aliaj priservadaj konstruaĵoj, i.a. kurachotelo kaj akvaparko. La multnombraj fontoj donas freŝan, „ordinaran” akvon, sed kelkaj el ili enhavas mineralaĵojn (jodidon, bromidon kaj salon), kiuj donas kuracan efikon kontraŭ variaj malsanoj. Pro tio oni nomas la urbon „Meko de reumatismuloj”.

En la kuracbanejo troveblas 4 subĉielaj kaj 3 kovritaj vidaĵbasenoj, kie pli ol kvardekspecaj kuracadoj estas utiligeblaj. La „Akva-Palace” tegita travivaĵbaseno havas

20 malgrandajn basenojn. Multaj saŭnoj kaj vaporbanoj, eĉ infraruĝa kajuto troveblas en tiu interesa banejo. La plaĝo etendiĝas sur 30 hektaraj parkoj kun 13 basenoj. Funkcias tie „mediteranea marbordo”, ondobanejo, boatlago kaj diversaj sportejoj ktp. En la akvaparko estas nenombreblaj deglitezoj, akvofaloj, kaj – ĉefe por la infanoj – multaj interesaj basenoj. En la naĝejo „Árpád” dum la tuta jaro oni povas naĝi, eĉ fari naĝkonkursojn.

Debrecen

Debrecen estas la dua urbo de Hungario laŭ la nombro de loĝantoj. La termalbanejo troveblas en la urboparto „Nagyerdő”. La bankonstruaĵo havas tegitan halon, en kiu estas termakvaj basenoj kun 33, 35 kaj 38 C⁰-j kuracakvoj. Ankaŭ havas la banejo pli malgrandajn basenojn kun 20-40 C⁰-j akvoj kaj eksterajn basenojn. La meznombra temperaturo de la tiea kuracakvo estas 65 C⁰, kaj la mineralaĵoj abundas en ĝi i.a. alkalaj kloridoj, hidrokarbonatoj, jodidoj, bromidoj, natria-kloridoj, kalcioj, magnezioj kaj metaboracidoj. Apud la tradicia banterapio en la banejo oni uzas fizikokaj movterapiojn. La kuracadon kaj la kontrolon faras kuracistoj de la hospitalo „Kenézy Gyula”. En la bankomplekso estas ankaŭ la travivaĵbanejo „Aquaticum Mediterrán”, kiu troveblas en grandega kupolhalo, kiu havas 66 m-ojn da diametro. Multaj diverstipaj saŭnoj kaj basenoj donas al la gastoj bonan sinsenton.



Nyíregyháza



En 2005 sur la teritorio de la Parkbanejo en Nyíregyháza-Sóstó konstruiĝis la nova bankomplekso en la kadro de la Széchenyi-plano. La banejo estas malfermita dum la tuta jaro, kaj certigas la preventan medicinon kaj sankonservadon. En la bankomplekso estas trovebla travivaĵbanejo kun multaj deglitezoj, masaĝoj, saŭnoj, diversaj basenoj eĉ aparte por la infanoj, ondebasenoj ktp. La akvo havas

kloridon kaj natrion. La kuracefiko de tiu kuracakvo estas ĉefe por la reumaj, ginekologiaj kaj kataraj malsanoj. La temperaturo de la akvo estas 34-38 C⁰.

Nyíregyháza ankoraŭ havas banejojn. Tiu estas la „Júlia”-banejo, kiu troveblas apud la mezo de la urbo. Ĉi tie ankaŭ eblas resaniĝi, ĉar tiu banejo havas kuracakvon, kaj kelkajn kuracbasenojn. La alia banejo estas la „Füüdőház”-banejo, kiu troveblas en Sóstó. Jam en la 1700-aj jaroj tiu malnova banejo servis la sanon, kaj en la jaro 2013

rekonstruiĝis kaj plilarĝiĝis. Nuntempe ĝi havas modernajn instalaĵojn kaj aranĝaĵojn. Kelkaj kurachoteloj konstruiĝis en Nyíregyháza, kiel la Hoteloj „Pagony” kaj „Aventinus”.

Miskolc-Tapolca



Ĝi estas parto de la granda urbo Miskolc. Tiu loko jam en la pratempe estis loĝitaj pri kio atestas multaj arkeologiaj trovaĵoj. En la 11-a jarcento oni konstruis preĝejon kaj monaĥejon. La monaĥoj jam en tiu tempo funkciigis banon, kion nutris kuracakvo el groto. En la jaro 1830 la episkopo Kollonich konstruigis tegitan banejon. En la 20-a jarcento urbo Miskolc aĉetis la banejon, kaj komencis la utiligon de la natura groto. Multaj hoteloj,

pensionoj, ripozejoj, restoracioj kaj gastdomoj konstruiĝis en la urboparto. En la grotbanejo troveblas kelkaj basenoj, hidroterapio kaj masaĝo. Ekster la groto funkcias kelkaj kuracbanbasenoj, kabineto de kuracistoj eĉ malvarmakva plaĝo. La grotbanejo funkcias dum la tuta jaro, kaj multaj eksterlandaj gastoj serĉas la resaniĝon en la banejo.

La kuracakvo enhavas multajn altvalorajn mineralojn, kiujn oni povas uzi kontraŭ multaj eksteraj kaj internaj malsanoj.

Zalakaros

La historio de tiu kolonio ririgardas al la 13-a jarcento, ĉar dum multaj jarcentoj la homoj, kiuj loĝis en tiu regiono, uzis la kuracakvon de la tieaj troveblaj fontoj por kuraci diversajn malsanojn. En la 18-a jarcento Zalakaros jam estis vilaĝo, kaj post la konstruo de la Suda Fervojo (Déli Vasút) ĝi rapide evoluis. En 1962 la vilaĝanoj rekonis la signifon de la termakvo, kaj komenciĝis la konstruo de la banejo. Zalakaros ricevis en 1997 la urban rangon, kaj rapide daŭrigis la konstruon de hoteloj, ripozejoj, banejoj. La akvo estas alkalia-kloridaj kaj hidrokarbonataj kuracakvo, en kiu ankoraŭ estas troveblaj jodido, bromido, sulfuro, fluoro, kalio, natrio, magnezio, fero, mangano kaj karbacio. Pro tiuj multspecaj kemiaĵoj la banejon vizitas multaj malsanuloj ne nur el Hungario, sed ankaŭ el la tuta Eŭropo. En la kuracbanejo funkcias multaj banbasenoj, kuraccentro kun multaj terapioj kaj aliaj plaĝoj kun kelkaj deglitezoj.



Bükkfürdő

En belegaj parkoj troveblas tiu bankomplekso, entute kun 32 basenoj, kun pli ol 5 mil m² akvasurfacoj, kurac-, plaĝ- kaj travivaĵbanejoj, kun modernaj saŭnoj, „Wellness” centro kaj kun efika terapeŭtiko. La temperaturo de la kuracakvo estas 32-38 C⁰, kaj la malvarmakvo estas 26-28 C⁰. La tegita travivaĵbanejo estas malfermita dum la tuta jaro. Ĝi havas kvin basenojn, kelkajn deglitojn, saŭnojn, „Wellness-centron”. La kuracakvo havas 15.000 mg/l mineralaĵojn, inter ili la plej gravaj estas la alkali-hidrogenkarbonato, alta kalcio, magnezio kaj fluoro. Tiel la kuracakvo donas al la malsanuloj sanigefikan kuracadon, kiam la suferplenaj plendoj mildiĝas eĉ ĉesas, kaj la malsanuloj povas regajni la korpan kaj animan harmonion.



Multaj eksterlandanoj – ĉefe aŭstroj - vizitas la banlokon, eĉ ili aĉetis domon tie, por ke ili povu ĉiutage viziti la banlokon. En la urbeto estas multaj hoteloj, pensionoj, apartmandomoj kaj gastĉambroj, eĉ elegantaj restoracioj kaj gastejoj.

Sárvár



En la 90-aj jaroj oni malkovris la kuracefikajn akvojn en la urbo Sárvár. Duspecaj kuracakvoj troveblas tie, la unua venas el 1200 m profundece, kaj ties akvo havas 43 C⁰-n, la dua jam venas el 2000 m, kaj ties akvo havas grandan salenhavon, kaj la temperaturo de tiu akvo estas 83 C⁰. Ĉi tiu kuracakvo havas gravajn elementojn el la natriumklorido, hidrogenkarbonato, jodido, bromido

kaj fluoro. El la salo oni produktas per distilo la faman termalkristalon: „Sárvári kristály”. La kuracakvo efike kuracas la movorganajn, ginekologiajn kaj dermatologiajn malsanojn. Pro tio dum la tuta jaro estas plenplena la banloko.

Mem la kuracbanejo finkonstruiĝis en la jaro 2002, kaj ekde tiam oni konstruis travivaĵbanejon, plaĝon, saŭnojn kaj ses elegantajn kaj bone ekipitajn hotelojn, kelkajn pensionojn kaj apartmandomojn, restoraciojn kaj gastejojn.

Mórahalom

La urbeto troviĝas 20 km okcidente de urbo Szeged, apud la landlimo hungara-serba.



Mórahalom en 1992 festis la centjaran datrevenon de sia fondaĵo. La urban rangon ĝi ricevis en 1989, kaj iĝis la centro de la dense loĝataj farmbienoj.

En la urbo oni malkovris la kuracakvon en la 90-aj jaroj, kaj ĝi ricevis la kuracakvan kvalifikon en 1999. La jodida akvo enhavas multajn mineralajn materiojn, kies kuracefiko ĉefe la reŭmatismajn malsanojn kuracas. Pro tio oni nomas la banejon „la centro de la genuo kaj ŝultro”. Estas gravaj la efikoj de tiu akvo kontraŭ la haŭtaj-, nervaraj-, movorganaj- kaj ginekologiaj malsanoj. La

„Sankta Elizabeta” kuracbanejon nutras kvarspecaj boradputoj. La banejo havas 21 basenojn. La bankomplekso havas „Wellness” kaj infanbanejon kaj plaĝon. Sep subĉielaj kaj dekkvar tegitaj basenoj troveblas en la plaĝo kun tri deglitoj kaj ok saŭnoj. Apud la banejo en la jaro 2011 konstruiĝis du hoteloj, „Colosseum” kaj „Elixir Medical Wellness”. Ankaŭ funkcias en la urbeto kelkaj pensionoj kaj gastejoj.

Parádfürdő

Ĉe la norda piedo de la montaro Mátra, en la valo Parád-Tarna troveblas tiu fama kuracbanejo. Jam en la jaro 1730 oni menciis la lokon kiel kuracejo, kaj ekde 1813 la malsanuloj uzas la kuracakvon, kiu enhavas multspecajn mineralajn materiojn. La plej konataj estas la akvo „csevice” enhavanta sulfurkombinaĵojn kaj la fer-luna banakvo. La kuracakvo grave enhavas kalcion, magnezion, sulfaton, manganon kaj alunon. Oni uzas la kuracakvon kaj por trinki (ĉefe la ŝtomakmalsanuloj) kaj por bani (ĉefe en la kadro de la ginekologiaj malsanoj). En



la 1820-aj jaroj komenciĝis grandiozaj konstruadoj en la valo Parád. Oni konstruis multajn hotelojn, gastejojn kaj kompreneble banlokon. Ĝis la fino de la 19-a jarcento jam funkciis ses hoteloj, sep gastejoj, kelkaj restoracioj, vendejoj kaj belega parko. En la 1930-aj jaroj konstruiĝis hospitalo kaj kurachotelo, kiuj kontinue akceptas la malsanulojn, kaj helpe de la kuracakvo, la freŝa kaj pura aero, eĉ la trankvila medio donas rapidan resaniĝon.

En ĉi tiu artikolo mi prezentas 10 kuracbanlokojn el la 45. Mi ege bedaŭras, ke pro la malmulta spaco de la revuo mi ne povas prezenti ankoraŭ kelkajn gravajn banlokojn, kiel Balf, Balatonfüred, Csokonyavisonta, Eger, Győr, Gyula, Harkány, Kaposvár, Kehidakustány, Kiskunmajsa, Mezőkövesd, Mosonmagyaróvár, Orosháza, Szeged, Szentés, Szigetvár ktp. Tamen mi kredas, ke la prezentitaj 10 banlokoj kaj la budapeŝtaj 8 kuracbanlokoj povas montri la riĉecon de kuracakvoj en Hungario. Eblas, ke mi daŭrigas tiun temon en la sekva numero de HFM.

István Gulyás



Ĉina delegacio en la Fervoĥistoria Parko



La 69-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017 en Francio, Alzaco, en la urbo Colmar. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.